

Joseph Döpjohann,  
Mia infana lingvo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kiel knabo paroladis  
nur platdiĉe mi,  
ĉar tiele instruinta  
estis panjo min.

Inter la infanoj urbaj  
sidis sole mi,  
kiuj flue paroladis  
la germanan ja.

Sed ne daŭris longan tempon,  
ĝis komprenis mi,  
ĝis mi povis legi tiun,  
ankaŭ skribi ĝin.

Iris mi for el la dom'  
kiel juna vir',  
lernis fremdajn lingvojn mi  
en la vasta mond'.

Nun volonte pensas mi  
kiel maljunul'  
pri la infanec' kaj pri l'  
lingvo de l' patrin'.

Tiam mi platdiĉan preĝon  
diras por mi mem,  
memorante jenan tempon,  
kaj esploras mi.

*Traduko de la Basgermana poemo "Miene Kinnerspraake" de JOSEPH DÖPJOHANN (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, \*1930-10-18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2003-04-16.*

MR-415-1 / Arg-251-509 (2004-07-04 22:05:37)

*Kun afabla permeso de l' aŭtoro, sinjoro Joseph Döpjohan (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio), prenita el la libro "Liäbensbeller" ("Vivobildoj"), kiu aperis en 1998 en la eldonejo E. Holterdorf, Ruggestr. 27 - 29, D-59302 Oelde, F. R. Germanio.*